BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



# Sonorilo

58a jaro n° 4
julio - augusto - septembro 1966

# Sonorilo

oficiala dumonata bulteno de B.E.F.

REDAKCIO : jaumotte maurice
roose fernand, sint-klaradreef 59, brugge    tel. (050) 319.81
maertens grégoire
poupeye charles

kunlaborantoj al regulaj rubrikoj :
dr. pol denoël    durwael ivo    iserentant roger

administrado : terryn j. raapstraat, 72 gent.


Belga Esperanto-Federacio


asocio sen profita celo

sidejo & prezidantejo
debruynlaan 44, wilrijk    tel. (03) 377758

honora prezidanto
kempeneers paul

honora vicprezidanto
sielens henri

ĝenerala prezidanto
jaumotte maurice

honora vicprezidantino
plyson j.

prezidantoj
debrouwere gerard, magdalenastraat 29 kortrijk
dro denoêl pol, 20 rue v. raskin liège

unua vicprezidanto
roose fernand

vicprezidanto fakestro pri teknikaj rimedoj
verstraeten jules, sint bernardse steenweg 1078 hoboken

ĝenerala sekretario
de roover r., luchtvaartstraat 28 borgerhout

sekretario por la nederlandlingva regiono
maertens grégoire, prins leopoldstr 51, st.-kruis    tel. (050) 34935


sekretario por la franclingva regiono
de cuyper georges, 66, rue de dorlodot, monceau sur sambre

kasistino    terryn juliette, raapstraat 72, gent

poŝtkonto de B.E.F. : 1634.34 raapstraat, 72, gent

ĉefdelegito de universala esperanto-asocio
fr. schellekens, frans hensstraat, 44, antwerpen 2
p.k. 9051.25


# 48-a kongreso de B.E.F.
## 28, 29 & 30.5.1966



## pentekosto
## loveno

Oni povis antaŭtimi ke la Lovena Kongreso ne rikoltus sukceson similan al la antaŭaj BEF-kongresoj, unue pro la fakto ke la tiea Grupo ankoraŭ ne atingis grandan membronombron. Due, kelkaj demandis sin, ĉu la lastmonataj politiko-sociaj eventoj, okazintaj en la kongresurbo, ne influus la kutime agrablan etoson de niaj propraj kunsidoj.

Spite ĉion, la 48-a estis sukcesa, brila, entuziasma. De la unuaj horoj ni sentis nin en frata atmosfero kaj la sinsekvo harmonia de la kongresaj eroj estis la rezulto de bona organizado kaj de detala zorgemo fare de freŝdata sed fervora LKK.

La LKK sukcesis okazigi la programerojn, same kiel la manĝajn aranĝojn, en unu loko, en la vasta kaj luksa « Salons Georges », kies posedantoj estis pli ol simpatiantoj.

**SABATON 28-5-66**

Malfermiĝis la akceptejo kaj la poŝtoficejo, kiu sub gvidado de S-ro Liesenborghs estis rapide sieĝata de la jam alvenintaj kongresanoj, ĉefe filatelistaj.

Tuj post la kutima KUNSIDO DE LA ADMINISTRANTOJ, okazis vizito al la **Vanderkelen Muzeo,** kie la konservisto S-ro Paul MAES, kun helpo de nia Ĝenerala Prezidanto Maurice JAUMOTTE (kiel ĉiam brila tradukanto), kondukis nin tra multaj ĉambroj, kies riĉa enhavo atestas pri la multfaceta arta historio de Loveno.

La OFICIALAN MALFERMON de la kongreso enkondukis la Prezidanto de la LKK, advokato Fernand PIOT, membro de la urbestraro, kaj kiu salutis kaj bonvenigis la partoprenantojn, nome de la LKK kaj de la urbestraro. Sekvis la salutoj de reprezentantoj de la BEF-grupoj kaj de partoprenantaj eksterlandanoj, inter kiuj, S-ano Ralph HARRY,

ambasadoro de Aŭstralio, kiu tre simple eldiris sian ĝojon, esti inter ni. Nia eminenta samideano cetere ĉeestis la kongreson ĝis dimanĉo vespere. Fine S-ro JAUMOTTE, en entuziasmiga **Festparolado**, esprimis siajn sentojn pri la situacio de niaj nacia kaj internacia movadoj.

La DISTRA VESPERO komenciĝis per **kolordiapozitivoj** pri Loveno komentataj de S-ino MEURRENS kaj projekciataj de ŝia filino Leona. La bildoj, afable pruntedonitaj de la urbestraro, donis al la kongresanoj informojn pri ĉiuj aspektoj de la urbo, utila kontribuo, ĉar tro ofte ni ne havas tempon promeni tra la kongresurbo mem. La dua parto estis dediĉata al amuza KVISO, sub gvidado de S-ano Ghislain JACOBS : unu grupo de kvar viroj ludis (kaj gajnis) kontraŭ unu grupo de kvar virinoj, sed ĉiuj ricevis premiojn, valoraj pentraĵreproduktaĵoj.

**DIMANĈON 29-5-66**

Je la malfermo de la giĉetoj estis denove alfluo de kongresanoj, dezirante i.a. aĉeti kartojn kun poŝtmarkoj stampitaj per la speciala stampo, kiu kiel la antaŭa reklama poŝtstampo, tre utilas al la disvastigo de nia lingvo.

Al la KUNVENO DE B.E.F. partoprenis ankaŭ la membroj de BEJA, kun 5 afrikaj studentoj, kies prezidanto alparolis la kongresanojn.

La OFICIALA AKCEPTO en la urbodomo okazis fare de S-ro SPROCKEELS, skabeno por instruado, kaj en ĉeesto de advokato W. BAETE, eks-skabeno. D-ro PIOT prezentis la kongresanojn kaj S-ro SPROCKEELS tre afable paroladis. La paroladoj estis tradukitaj de nia ĝenerala prezidanto, kiu eluzis la okazon por doni etan gramatikan kurson al la eminentuloj — ili poste konfesis ke ili jam multe komprenas en Esperanto ! Sekvis la kutima **vinregalo** kaj la **komuna fotografado** sur la ŝtuparo de la urbodomo, en ĉeesto de ĵurnalistoj kaj ĉefe sub la impreso de neatendita programero : la ludo de nia himno sur la sonorilaro de apuda preĝejo S-ta Petro, fare de la talenta orgenisto kaj kariljonisto VANSTEENWEGHEN.

Posttagmeze, tuj post la ĝenerala Jarkunveno de BEJA, la kongresanoj promenis al la GRANDA BEGINEJO, kie la gvidado estis farata de S-ro DE POORTER, asistanto de Prof. Lemaire de la universitato. Kvankam en restaŭrado, la vizititaj konstruaĵoj, posedataj de la universitato, respegulas unu aspekton de la riĉa kaj altkultura pasinteco de Loveno.

Je la 17-a h. okazis en S-ta Mikaelo, la SANKTA MESO, kun preĝaro en Esperanto. Ĝi estis prizorgita de Frato Arni DECORTE kaj celebrita de Kanoniko GILLET (el Abatejo de la Cambre Ter Kameren) kun esperanta prediko. Tiu meso, ĉu pro la granda nombro de la ĉeestantoj, ĉu pro la klarigoj ricevitaj de Kanoniko GILLET pri nia Esperanto-movado en la tuta mondo, faris profundan impreson sur la pastraro en Loveno.

La tradicia BANKEDO kaj entuziasma BALO finis la vesperon.

**LUNDON 30-5-66**

La ekskursa tago komencis per veturado al Tervuren, por interesa



**LA DIKIGA BRUA KONGRESO**
**EN LOVENO**

**Ke poetino provis**
**kongreson organizi,**
**kaj ke ŝi tion povis**
**sukcese : por precizi,**
**Anna Meurrens ĝin kapablas**
**kaj plidikigis ĉiujn,**
**(al gastoj ŝi afablas)**
**per bonmanĝaĵoj, kiujn**
**ŝi metis sur programo :**
**do plia kilogramo !**

**La kongreso estis brua**
**pro l'ega ... entuziasmo**
**verdstela kaj ... menua**
**en loko de Erasmo. (1)**
**Kaj eĉ am-bas-adoro (2)**
**vigligis l'aman senton**
**en multa juna koro,**
**vigligis ... elokventon.**
**Kongreso estas sperto.**
**Por iuj eĉ averto ...**

**Imponis kongresanoj,**
**ĉar ili lingve lertis**
**kaj eĉ de l'Kongoanoj**
**la « krokodilo » esceptis.**
**Unika urbodomo**
**kaj la muzeo ravis.**
**Fremdlanda plura nomo.**
**La beginejo gravis :**
**beginoj iom strangaj,**
**eĉ viroj diversrangaj ...**

**La diservo estis dota**
**kaj multaj ĝin ĉeestis**
**pro l'prezidanto Pi-ot(a).**
**En abatejo ŝajnestis**
**Jaumotte la abato.**
**Aŭdiĝis « La Espero »**
**kariljone en la strato.**
**Ĝi ŝajnis min en vero**
**apelo Orselini-a (3)**
**do bonreputacia !**

**TYNEVERUM**

---

vizito al la AFRIKA MUZEO. S-ro TIMMERMANS, muzea gvidanto kaj S-ano Wim DE SMET, de la Instituto por Natursciencoj en Bruselo, donis tre interesajn klarigojn.

La ekskurso daŭris ĝis Oud-Heverlee kaj Zoete Waters, kun kvar belaj lagoj. Tie oni tagmanĝis en Hotel St.-Jean. Poste ni vizitis la Abatejon de Park- Heverlee, en rava kadro de multaj lagoj, sub gvidado de Patro Norbertano kaj majstra tradukado de S-ro Jaumotte. La partoprenantoj multe admiris tie malnovan meblaron. Inter diversaj malnovaj pentraĵoj, unu de Verhaeghen. Aliajn artaĵojn de tiu pentristo ni krome admiris en la preĝejo de Wilsele, en kies tombejo li eterne ripozas.

Lasta ĝojiga kunveno okazis en la salono de la paroĥa domo, kie altabliĝis la kongresanoj por bongusta vespermanĝo, prizorgita de F-inoj M.-T. HENQUINEZ kaj Leona MEURRENS.

Tiujn tri agrablajn belajn tagojn ni ŝuldas al nia Lovena LKK, kiu sub gvidado de S-ano D-ro PIOT streĉe laboris dum pluraj monatoj. Al ĉiuj membroj ni devas diri : dankon pro tiu sukcesplena kongreso, pro tiuj modelaj aranĝoj ! Sed ni certe ŝokos neniun, se ni esprimos apartan admiron por S-ino A. MEURRENS, la centra aktivulino de tiu abelaro, kaj kiu kun trankvileco estis ĉie dum la kongresaj tagoj por helpi nin, por agrabligi nian restadon.

La venonta BEF-Kongreso disvolviĝos en Karloreĝo. Tie alia virino, F-ino ORSOLINI, organizas ĝin. Ĉu nova tradicio por niaj estontaj kongresoj . . . ?

Dr. P. D.

---

1. **Erasmo estis loĝanto de Loveno, ekde 1517, dum kvar jaroj.**
2. **Ĉeestis el Bruselo la aŭstralia ambasadoro.**
3. **La posta kongreso okazos en Karloreĝo.**

## ADMINISTRANTARA KUNVENO OKAZIS

### LA 1.10.1966

En Monico Nord ĉe la Norda stacidomo okazis la unua admintrantara kunsido de la nova laborjaro. Sur la tagordo troviĝis diversaj interesaj punktoj kiuj povas grave influi nian enlandan novadon i.a.

preparo de la nova laborsezono — junularo — financoj — reprezentado de la fakorganizoj en Belgujo en la kadro de BEF — kursoj.

Preskaŭ ĉiuj administrantoj ĉeestis kaj la decidoj kiuj povas interesi la anojn aperos en la sekvanta numero de Sonorilo, kiu estos la lasta de ĉi-tiu jaro.

**EN NOVEMBRO 1966** aperos nova libro de la aŭtoro de RETORIKO kaj aliaj verkoj

**I V O  L A P E N N A**

**ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ**

(Suplemento al RETORIKO)

**Antaŭparolo - Enkonduko - Du Partoj**

**La Unua Parto** konsistas el 16 paroladoj faritaj inter 1950 kaj 1965 dum la Universalaj Kongresoj aŭ en aliaj okazoj, inkluzive la pledojn por Esperanto en la Ĝeneralaj Konferencoj de UNESKO en Parizo (1952) kaj Montevideo (1954).

**La Dua Parto** enhavas tri tekstojn pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj, D-ro L. L. Zamenhof kaj U.E.A., kiuj povas esti taŭge utiligataj aŭ komplete aŭ parte ankaŭ por prelegoj, radioelsendoj, artikoloj aŭ informoj.

**ELEKTITAJ PAROLADOJ KAJ PRELEGOJ**

kies enhavo iusence signas la etapojn de evoluo de la Esperanto-Movado en la eventoplenaj 15 jaroj, al kiuj ili rilatas.

Proks. 150 pp., formato 25 × 15 cm (kiel Retoriko) plaste bindita.

**Vendoprezo** post la publikigo: 11 Gld. aŭ 44 steloj; **por antaŭmendantoj ĝis la 15-a de oktobro 1966**: 9 Gld. aŭ 36 steloj.

Utiligu la favoran prezon kaj mendu tuj.




RABATO POR ESPERANTISTOJ



# BUDAPEST 1966

Veteranino kiu jam de longe ne plu ĉeestis internacian kongreson diris al ni : antaŭe la kongresoj estis pli « inter ni ». Vere, tia grandskala kongreso, tiel multnombre vizitita, kiel ĝi okazis en Budapeŝto impresas tute alia ol « amika rondo ». Ĝi vere reprezentas la evoluon de nia movado kaj la evoluon de la vojaĝeblecoj de la geesperantistoj. Sed ne dubu, la amikoj sin retrovas, ankaŭ en amas-kongreso.

**BUDAPESTO**

La akcepto de Budapeŝto estis elkora : pro la flagoj, pro la montro-fenestroj pro la ejoj, pro la atmosfero, pro la cigaredoj (kun Esperanto kiel marko), ni tuj sentis nin « persona grata » : ni, 4010 geesperantistoj el 42 landoj. Rekordo ? Ne ankoraŭ, ĉar Nürnberg kunigis 4963 anojn. Tamen ni povas supozi ke la nombro de la ĉeestintaj Esperantistoj en Budapeŝto estis multe pli alta ol 4000 !

**INAŬGURO**

Post la brua interkona vespero, la inaŭguro de la kongreso okazis en la Petöfi - pavilono (ne tre taŭga por solenaj malferma kaj ferma kunsidoj, nek por la balo, kiu ankaŭ okazis tie) Prof. Lapenna scipovis denove kuntiri la ĉeestantojn, kvankam la laŭ ni plej bona parolado de la lastaj jaroj okazis en Bruselo por la 45-a. Dum tiu malfermo S-ro Jaumotte salutis nome de la belga ambasadora sekretario kaj nome de la Ministro pri Edukado. S-ro Debrouwere salutis nome de la federacio.

La parolado estis omaĝo al Hungarujo, al la budapeŝta skolo kaj ties du kolosoj, la honoraj kongresanoj Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay, sed ĝi ankaŭ okupis sin pri la problemoj de la movado kaj kelkaj negativaj fenomenoj en ĝi.

Kaj inter tiu inaŭguro kaj la ferma kunsido de la lasta sabato, ni trovis denove tiom da programeroj ke ofte oni devis elekti inter kelkaj kiuj okazis samtempe.

**Kulturaj aranĝoj & tria internacia Festivalo**

Malgranda estis la nombra de partoprenantoj en la Oratora konkurso. Mankis ĉi-foje kandidatoj el Orienteŭropaj landoj entute. La

3-an premion gajnis Ibrahim Tambura, Malio, kaj la 1-an Aŝvinikumar, Hindujo, ambaŭ jam konataj al kongresa publiko. La 2-a premio ne estis dediĉita.

La Belarta Konkurso denove konfirmis la superecon de la Esperantisto el la Orienteŭropaj landoj sur la literatura kampo. Preskaŭ ĉiuj premioj estis aljuĝitaj al esperantistoj el tiuj landoj.

Inter la sep prelegoj de la Internacia Somera Universitato certe elstaris tiu de profesero D-ro E. Bokarev, Moskvo, pri Fonemo kaj sono en Esperanto, kun 360 ĉeestintoj, kaj tiu de Gaston Waringhien pri la Budepeŝta Skolo, kiu altiris, ankaŭ certe pro specialaj motivoj, pli ol 450 gekongresanoj.

Tradiciaj programeroj en la universalaj kongresoj estas la evangelia kaj katolika diservoj, kiuj ankaŭ en Budapeŝto unuigis multnombran ĉeestantaron ; ni speciale mencias la kanthoron kiu prizorgis la ravan St.-Meson de Mozart en la Franciskana preĝejo.

Sian specialan aspekton ricevis la kongreso de la aranĝoj de la 3-a Internacia Arta Festivalo. Teatraj ensembloj kaj geaktoroj el Pollando, Bulgarujo, Jugoslavio kaj Hungarujo kontribuis al altnivela programo. La Internacia Arta Teatro sub la direkcio de Srdjan Flego trafis la guston kaj la ŝaton de sia publiko : la kongresa semajno estas tiel laciga kaj streĉa ke la kongresanoj ŝatas ĉefe amuzajn teatraĵojn ; kaj tiaj estis la tri unuaktaj verkoj de resp. Molnar (La unua Paŝo), Matkovic (La morto de lia ekscelenco) kaj J. Baghy (La holanda Pupo). Feliĉe ankaŭ ke ni povis vidi la faman « Kataki-Malamiko » de la Usona verkisto Shimon Wincelberg, pere de la bona prezentado de la teatro de Lodz, jam luditan pasintjare en Tokio.

### INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AUTOMOBILISTA

**okazigis kunvenon sub prezido de S-ro M. Jaumotte kaj partopreno de 60 personoj. La tagordo konsistis el la priparolo de la Statuto kiu plilarĝigos sian laborprogramon al la Turismo kaj pritraktos do ĉiujn problemojn en rilato kun la turismo en la plej larĝa senco. La provizora estraro estas definitive instalita kaj la statuto akceptita sub rezervo de etaj ŝanĝoj pri kiuj la membroj voĉdonos skribe. La « Auto-Revuo » iĝos revuo « Aŭto kaj Turismo » — Revuo de la Internacia Esperanto Klubo Automobilista.**

### Akcepto en la Parlamentejo

Merkredon posttagmeze, la Alta Protektanto de la U.K., vicprezidanto de la Hungara Popolrespubliko prezidis solenan akcepton al kiu estis invitita grava nombro de eminentuloj kaj gvidantoj.



Lia Moŝto S-ro Odön Kishazi bonvenigis la invititojn.

La Prezidanto de UEA, D-ro I. Lapenna dankis per kelkaj trafaj vortoj, post kio malfermiĝis plej alloga bufedo.

Ni diru ke, antaŭ tiu iom vasta akcepto, la Alta Protektanto estis bonveniginta, en privata salono de la Parlamanetejo la estraron de UEA.

Dum plena horo, S-ro Kishazi babilis kun ĉiuj kaj informiĝis pri la evoluo de la Kongreso kaj pri la movado.

### Solena FERMO

La fermo de la Universala kongreso neniam estas nur solenaĵo : ĝi akceptis ĉi-jare rezolucion adresitan al UNO kaj rezolucion direktitan al la subskribintoj de la UEA-peticio, trian pri la utiligo de Esperanto por fakaj celoj kaj lastan pri Esperanto en la lernejoj.

Konklude ni povas diri ke la Budapeŝta kongreso iĝis la plej impona postmilita kongreso, kaj ĝi povas esti startpunkto por sukcesa estonta agado.

### La Karavano al Budapeŝto

sukcesiĝis por ĉiuj kunvojaĝintoj : en internacia atmosfero ni kune travivis tri semajnojn : tri Usonanoj, ses Angloj kaj unu skoto, unu francino, ses nederlandanoj kaj 23 anoj de BEF sub gvidado de S-ro Maertens G. traveturis Ĉeĥoslovakujon, Hungarujon, Aŭstrujon kaj Germanujon : ili interamikiĝis, fotis, aĉetis, kongresis, svitis, veturis, foje dormis, kantis kaj vidis tiom da belaĵoj ke ili bezonis kelkajn semajnojn por klare vidi kaj konstati ke ili faris unikan vojaĝon.

Aparte bela estis la kongresa ekskurso al Kecskemet, elektita de la malplimulto sed certe unu el la plej interesaj : neforgeseblaj estis la tagmanĝo kun la dancantaj feinoj kaj cigana muziko (tian muzikon kelkaj jam aŭdis la unuan sabaton en la citadelo de Budapeŝto, sed tiam kun multe da vino).

La dua granda BEF-karavano sukcesis !

### Akcepto ĉe la Belga Ambasadoro en Budapeŝto

**Kelkaj estraranoj de BEF i.a. Gesinjoroj Jaumotte kaj Debrouwere estis invititaj de la Belga Ambasadoro, kie okazis gaja kaj interesplena babilado kun la Ambasodoro mem, kun la sekretario kaj la kanceliero. Ni dankas la ekscelencon pro tiu gesto kiu cetere pruvas ke la kongreso en Budapeŝto vere impresis la oficialajn instancojn.**

# LA PROBLEMO DE INTERNACIA HELPLINGVO

En la jubilea numero de la tre interesa « The International Language Revieuw » (Nov. 1965 - Feb. 1966 ; adreso : P. O. Box 393 DENVER, Colorado 80201, U.S.A.) ni legas komunikon de la konata Amerikana profesoro pri Romanida filologio ĉe la Columbia universitato en New York, Mario Pei. Ekzemplero de lia verko « One Language for the World » estis sendita al la ministro de Hindujo Pandit Nehru.

## ESTAS POR ĈIU LANDO

## APARTA KAJ MALSIMILA PROBLEMO

La profesoro ricevis longan respondan leteron en kiu P. N. diris i.a. : « Ni rigardas kun granda simpatio al la strebado de via asocio por akiri la adopton de unu monda lingvo por ĉiuj nacioj de la mondo. Sed ni, en Hindujo, havas vere specialan problemon. Ni havas dekses primitivajn aŭ regionajn lingvojn kiuj devas esti instruataj en la regionaj lernejoj. Ni faras nun klopodojn por enplanti la Hindi-lingvon kiel nacian lingvon. Ni devas gardi la Anglan por niaj internaciaj kontaktoj. Tio faras jam tri lingvojn kiuj devas esti instruataj en ĉiu de niaj lernejoj. Nun vi proponas aldoni kvaran por internacia uzo. Ni timas ke la ŝarĝo de kvar lingvoj estas pli ol nia lerneja sistemo povas porti. »

Je tio Prof. M. Pei respondas : « Se internacia lingvo por monda uzo estas adoptita de ĉiuj nacioj, vi ne plu bezonos nek la Anglan nek la Hindi- lingvon. La internacia lingvo povas esti uzata ambaŭ por viaj internaciaj kontaktoj, anstataŭ la Angla, kaj por viaj interregionaj kontaktoj, anstataŭ la Hindi-lingvo. Tio signifus ke via lerneja sistemo povus esti pli ekonomia, instruante du anstataŭ tri lingvojn, la regionan kaj la internacian, utilan por ĉiuj kontaktoj, ankaŭ inter viaj multlingvaj ŝtatoj. »

Je tio venis ne plu respondo. Efektive la rezonado ne povas esti pli logika, kaj elfermas ĉiun kontraŭargumenton. Je ĝi, nur du sintenadoj estas plu eblaj : la idealista kiu konsistas en tio-ĉi ke oni akceptas ĝin, en la espero ke iam la internacia-lingvo estos adoptita ; aŭ la tiel nomata realista kiu konsistas en tio-ĉi ke oni decidos adopti ĝin kiam ĝi estos jam adoptita de pli malpli ĉiuj nacioj. Se oni konsideras la homan naturon, kaj se oni konsideras la influojn kiuj premas la kon-



P. V. B. A.

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj – Speguloj –
„securit" vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

telefono 37.88.20

cernajn respondecajn (ŝtat) estrojn, ĉu oni povas riproĉi ilin se ili prenas la duan starpunkton ? Estas tial ke mankas io en la rezonado. Devas esti io kio povus konvinki ankaŭ la atendemajn gvidantojn. Kaj ni havas tiajn argumentojn ! Unue, la studado de esperanto ne estas grava pliŝarĝigo de la studprogramo ĉar ĝi estas facila. (Tial ankaŭ Esperanto devas resti facila !). Due, per Esperanto la lernanto povas jam kontakti junajn kamaradojn en preskaŭ la tuta mondo. Ĝi estas tre forta argumento nun, ĉar oni insistas pli kaj pli al edukado en senco de tuthomaranismo. Kaj trie, la studado de esperanto estas bonega preparo al studo de lingvoj, ankaŭ al studo de propra gramatiko. La klarigado de ĉi-lasta fakto postulus apartan artikoleton. En nia lando ni havas problemon de linvostudada kiu kelkrilate similas al la skizita. Pro praktikaj postuloj ankaŭ niaj infanoj devas studi diversajn lingvojn, kaj tio estas certe baro al la disvastiĝo de esperanto. La rezonado de prof. Mario Pei validas ankaŭ por ni. Sed ni nepre ne forgesu bone montri la veron de la pliaj argumentoj kiuj estas nekontraŭdireblaj. Plie, ni klopodu havi la grandan virton de la pacienco en nia strebado, ĉar la tempo kaj la evoluo de la homaj rilatoj laboras en nia favoro.

Drs. F. Roose

**FONDAJO JAUMOTTE - LOQUET**

| | |
|---|---|
| Transpreno | 103.000 F |
| Kontribuo de S-ino De Hondt - Hubens, Antverpeno | 1.000 F |
| | 104.000 F |

11-an de oktobro: Rakonto kun diapozitivoj pri la karavano al la Budapeŝta kongreso. S-ro. Gr. Maertens kaj F-ino. M. Willems.
24-an de oktobro: Konkursludado (Kvizo) S-ro. D. Demeulenaere.
15-an de novembro: Libertempado en Rhodos, parolado kun diapozitivoj de F-ino. Y. Poupeye.
29-an de novembro: Debato pri Esp. gazet-artikolo.
13-an de decembro: Klasika Grekujo, parolado kun diapozitivoj de F-ino. Y. Poupeye.
27-an de decembro: « Sorĉistina Proceso » Parolado de S-ro. Ch. Poupeye.
Krom tiuj povos okazi neprogramitaj kunvenoj je aliaj datoj; la memoroj estos speciale alvokitaj.
Ni gratulas S-ron Ch. Poupeye, nia Prezidanto kiu iĝis kavaliro en la kronordeno (3.8.1966).

LES ENTREPRISES
DERKS
226, Rogierstrato, BRUSELO 3
Tel.: 16.87.92
Entrepreno de
KONSTRÛAJOJ



**Ensendojn por la novembra-decembra numero ni petas antaù la 30.10.66**

**KORESPONDANONCOJ**

1) **S-ro Noel C. AUSTIN**
**3 Queensdale Crescent**
**Knowle Park**
**BRISTO 4 (England)**
**Deziras korespondi kun Belga samidean(in)o por interŝanĝi uzitajn aŭ neuzitajn P.M., aŭ aĵojn aliajn pri kiu mia estonta korespondant(in)o interesiĝas.**

2) **S-ro Arnold SEKULA**
**Frolkova 1112**
**STRAZNICE (Ĉeĥoslovakio)**
**Deziras korespondi kaj interŝanĝi P.M. de ĉiuj landoj pri la temo « SPORTO ».**

**TADEUSZ MICHALSKI - BRONICWSKIEGO 16-14 WARSZAWA. POLLANDO Asistanto al Universitato de WARSZAWA ŝatas korespondi kun flandraj intelektaj fraŭlinoj.**

**Fraŭlino ALICJA WALCZAK str. Ks. SIEMASZKI 17/220 KRAKOW (POLLANDO) katolik. flegistino ŝatas korespondi kun katolikaj intelektaj gejunuloj.**



## BIBLIOGRAFIO

**Walter Trobisch: « Mi Amis Junulinon ». Eldonis Trobisch 757 Baden-Baden Lange Strasze 50.135 paĝoj.**
**Prezo: 6 Germ. Markoj por la kartonita, kaj 8 markoj por la bindita eldono. Esperanto-traduko de Adolf Burkhardt.**

La fakto ke tiu libro estas jam eldonita en 25 lingvoj, inter kiuj kelkaj Afrikaj kaj Aziaj, montras sufiĉe ĝian gravecon kaj sukceson. La temo estas ja atentiga! Estas kolekto de leteroj inter juna amanto, lia spirita gvidanto kaj la amatino, kiuj formas tiun kvazaŭan romanon. La morala nivelo estas tre alta. Pastoro Trobisch tre funde pripensas kaj priparolas la problemojn. Pri nur unu psikologia konsilo mi ne povas akordiĝi tute fine de paĝo 24. Estas en ĝi multaj trafaj esprimoj de realaj situacioj, kiel ekzemple: la korpa kuniĝo de du homoj plenumas sian celon nur kiam ĝi estas esprimo de amo (p. 12). Sed sur sama paĝo estas ne ĝusta vorto « dezirojn » devas esti « aspirojn » (23-a linio). Malĝusta esprimo estas ankaŭ: kaŝi de vi (p. 23). Se la granda plimulto de la libroj konsistus el tiaj, anstataŭ el tiuj nunaj kun mala etoso, mi kredas ke multe pli da junaj homoj trovus vojon kaj certecon en la ĝangalo de la vivo kaj estus pli feliĉaj.

**F. Faulhaber: « Ne tiel, sed tiel-ĉi ! ». Eldonis Dansk Esperanto Forlag en Aabyhoj Danlando; 1965. 64 paĝoj.**

« Ho, ho » mi pensis, kiam mi prenis la libreton en mano, « respondo al « Ne Tiel » de R. Schwartz ! Do, daŭrigo de la polemiko pri la pasiva uzo de: estis -ita, kaj estis -ata ». Sed mi eraris. Estas tutsimple broŝuro en kiu la sperta aŭtoro montras kiel skribi kaj kiel ne skribi; la ĝustan lokon de la vortoj por ke la frazo estu plej klara. Kun tre granda atento oni legos la paĝojn 53 ĝis 61 pri la efektive komplika afero de la neologismoj. Ĉiu serioza esperantisto aĉetu kaj ĉiu serioza grupo ofte uzu ĝin en la laborkunvenoj.

**G.P. De Bruin: « La Komencanto » Leerboek voor V(oort) G(ezet) L(ager) O(nderwijs) — en U(itgebreid) L(ager) O(nderwijs)-scholen; bewerkt door F. Faulhaber en A.M.D. Korff.**
**Uitgave F(ederacio) de L(aboristaj) E(sperantistoj) Amsterdam; 1965. 127 paĝoj. Prezo: 3.90 Ned.Guld.**

La fakto ke estas jam la oka preso, ĝis 31a milo, sufiĉe pruvas la taŭgecon kaj do la sukceson de tiu plaĉaspekta lernolibro. Estas 26 lecionoj. Do ĉiu leciono donas malmulte da gramatiko; sed multajn ekzercojn kaj vortarojn. La kursgvidanto tamen devos esti persono kiu funde konas la lingvon ĉar li devos ankoraŭ doni kompletigajn klarigojn pri la uzo de kelkaj eroj de nia gramatiko, kiel ekzemple pri la uzo de « sia » kaj de la pasivaj participoj.
Por Nederlandlingvanoj bona kaj bela libro.

La recenzitaj libroj estas haveblaj ce la librejo „Sonorilo" (Sro Iserentant R.) Kerklaan 61 Brugge, P.K. 152140

manufakturaĵo firmo DE BROUWERE

Magdalenastraat, 29, Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056) 216 54

# VIRINAJ BLUZOJ KAJ JUPOJ
# " MAGDELEINE "

deponita kvalitmarko

la perfekta konfekcio

fabrikita el plej bonaj svisaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj konfekcibutikoj

**PRECIPAJ CENTROJ :**

| | | |
|---|---|---|
| Antwerpen | : | Aalmoezenierstr. 2 |
| | | Abdijstr 57 |
| | | Anselmostr. 17 |
| | | Nationalestr. 87 |
| Arlon | : | Marché-aux-Légumes 16 |
| Brugge | : | Breidelstr. 8 |
| Brussel | : | Galerie d'Ixelles 9 |
| | | Anspachlaan 194 |
| Eupen | : | Kirchstr. 14 |
| Gent | : | Brabantdam 25 |
| Herstal | : | Rue Large Voie 4 |
| Leuven | : | Bondgenotenlaan 29 |
| Luxembourg | : | Place de la Gare 67 |
| Mechelen | : | Grootbrug 8 |
| Roeselare | : | Ooststr. 124 |
| Tournai | : | Rue Royale 75 |
| Turnhout | : | Herentalsstr. 6 |
| Verviers | : | Pont St. Laurent 2 |


— Presita en Belgujo de H. De Baene-Sercu, Delaplacestraat 9, Sint-Kruis Brugge —